lingvo kaj por tiu celo li fondis en la gimnazio esperantistan junularan rondeton. Absolvinte la gimnazion, li konatiĝas kun aliaj esperantistoj, aliĝas al UEA, partoprenas la trian kongreson de la bulgaraj esperantistoj en Ruse (1909.) kaj veturas al Bukureŝto, kie okazas la fratiĝo inter la rumanaj kaj la bulgaraj esperantistoj.

En la 1910. Atanasov enmatrikuliĝas kiel studento en la Sofian Universitaton. Tie li fondas kaj prezidas la Studentan Esperantistan Grupon. En la 1911. li estas elektita sekretario de la tiama Bulgara Esperantista Ligo. Sur tiu ĉi posteno li disfaldas sian senlacan energion; batalas kontraŭ la Idista skismo, agadas kiel organizanto, kunlaboras en kelkaj Esperantaj gazetoj, tradukas diversajn verkojn el la bulgara literaturo...

De la 1920. ĝis la 1926. ADA estas elektita vicprezidanto de la Bulgara Esperantista Asocio (BEA) kaj redaktoro, de ĝia organo "Bulgara Esperantisto". Al tiu periodo apartenas liaj klopodoj ĉe la tiama ministro de la popola klerigado kaj ĉe la Parlamenta Komisiono pri la klerigaj aferoj, por la enkonduko de Esperanto en la bulgarajn mezlernejojn. Lian febran agadon kronis nova granda sukceso; la bulgara parlamento decidis enskribi Esperanton en la liston de la studobjektoj por ĉiuj bulgaraj gimnazioj.

En la jaroj 1927.-1928. Atanasov fariĝis prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, posteno kiun li ekde tiam ofte kaj daŭre okupis ĝis la 1944. Dum tiu periodo li saĝe kaj lerte gvidis la bulgaran Esperanto-movadon, neniam fleksiĝante - nek sub vipo de mokoj, nek sub premo de potenculoj, nek sub minacoj de faŝistaj kaj naziismaj agentoj.

Sed ADA ne estas nur lerta propagandisto kaj spertulo pri la praktika laboro por Esperanto. Li posedas vastan filologian erudicion kaj profundajn konojn pri la Esperanta kaj la ĝenerala gramatiko, pri la delikataj nuancoj de la sintakso kaj de la stilo, pri la gravaj teoriaj problemoj de la ĝenerala lingvistiko kaj de la interlingvistiko. Tial en la 1963., kiam fondiĝis la Internacia Asocio de la Esperantistoj Filologoj, li fariĝis ĝia prezidanto. En la sama jaro li estis elektita membro de la Akademio de Esperanto kaj ekde la 1965. - ĝia vicprezidanto. ADA estas aŭtoro de kelkaj originalaj verkoj en Esperanto - eseoj, rememoroj, lernolibroj kaj de granda nombro da artikoloj pri diversaj temoj, precipe esperantologiaj.

Okaze de lia jubileo, ni gratulis elkore tiun ĉi veran heroon sur la batalkampo de la mondlingva ideo kaj bondeziris al li - al nia kara ADA - ankoraŭ pli longan vivon, sanon, forton kaj energion en la laboro por nia komuna celo.

Stojan Ĝuĝev



## 70 JAROJ DE PROF. S. ĜUĜEV

El "Bulgara Esperantisto" mi eksciis ke Prof. d-ro Stojan Ĝuĝev, kunredaktoro de ĉi tiu numero, estas same jubileulo en ĉi-tiu jaro. La 31-an de januaro la sofia esperantistaro solene celebris la 70-an naskiĝtagon de prof. Ĝuĝev - elstara bulgara esperantisto, membro de l' Akademio de Esperanto.

Ĉi tie ni provos nur montri kelkajn momentojn, kelkajn datojn, kiuj parolas pri la granda loko, kiun Esperanto kaj la Esperanto-movado, la Esperantaj idealoj trovis en la utila vivo de prof. Ĝuĝev, vivo plena de tiom da laboro, tiom da sciencaj penoj, tiom multe da sociaj devoj.

En 1934. S.Ĝuĝev komencis instrui en la Muzikakademio (Sofio), kie en 1937 li fariĝis docento kaj en 1943- profesoro. De 1954 prof. Ĝuĝev estis gvidanto de la katedro de muziksciencoj (historio de la muziko, muziketnografio, muzikakustiko kaj muzikpedagogio). La verkoj de prof. Ĝuĝev superas 3000 prestajn paĝojn, al kiuj oni devas aldoni ĉirkaŭ 300 artikolojn, parto de kiuj havas la karakteron de sciencaj studoj.

Unuafoje Ĝuĝev konatiĝas kun Esperanto kiel gimnaziano en 1918j. En 1920 j. Ĝuĝev komencas korespondi kun esperantistoj el la lando. Piede li iras en urbo Pazarĝik kaj tie fondas E-societon. Jam tiam, 20-jara, li komencas traduki el la bulgara literaturo en Esperanton. En 1921 li kreis kontaktojn kun la societoj de la junaj esperantistoj en la lando kaj preparas la unuan kongreson de la Bulgara Esperanto-Junularo. Dum sia tuta studado en Parizo (1926-1931). Ĝuĝev aktive partoprenis la vivon de la esperantistoj. Li prelegas, kunlaboras al la Esperanto-gazetaro, kreas kontaktojn kun francaj kaj alinaciaj Esperanto-pioniroj. Revenite Bulgarion li senĉese partoprenas la bulgaran Esperanto-movadon kiel vicprezidanto de Bulgara Esperantista Asocio (BEA), ĉefredaktoro de "Bulgara Esperantisto" de 1945-1956 - prezidanto de BEA, en 1967 - prezidanto de la unua en Bulgario Instruista E-Societo "Diĉo Petrov" ktp. En 1967 li ricevis grandan internacian rekonon - estis elektita kiel membro de l' Akademio de Esperanto.

Rimarkinda estas la energio kaj la granda intereso, kun kiuj prof. Ĝuĝev partoprenas la universalajn kongresojn de Esperanto; en Oxford - 1930 j., Londono - 1938 j., Bern - 1947 j., Malmo - 1948 j.,

*La Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario honoris per ordeno "Kiril kaj Metodi" - I-a grado nian s-anon prof. d-ro Stojan Ĝuĝev lige kun lia 70-jariĝo kaj pro liaj meritoj en la disvolvo de la bulgara muzikscienco kaj muzikpedagogio.*

Boĵ.Popoviĉ